

ALVOKO AL LA VIRINOJ DE LA MONDO

La minaco de hidrogena milito danĝere ŝvebas super la homaro kiel neniam antaŭe. Ĝi endangerigas ĉiun virinon, ĉiun viron, ĉiun infanon.

Sekve de la vetarmado elvokita de registaroj ambiciaj al militsupereco, la dismetado de novaj armiloj kaj fabrikado de neŭtronaj bomboj kondukos al pli danĝera vetarmado. Tempo urĝas. La vetarmado pli rapidas kaj danĝero minacas suriri la vojon de kie reveno ne ekzistas. Estas urĝe, kiel unua rimedo, malpermesi la neŭtronajn armilojn, haltigi la amasigon de la hidrogenaj armiloj en Eŭropo kies fabrikado ĉie ne okazu - ĉi tiuj devas esti likviditaj; ilia uzo kaj tiu de aliaj amasdetruaj armiloj devas esti kondamnitaj kiel krimo kontraŭ la homaro. Ĉiuj ekzistantaj stokoj devas esti detruitaj por tiel montri paŝon al ĝenerala kaj kompleta senarmigo. Por armigo oni elspezas unu milionon da dolaroj ĉiun minuton; virinoj kaj infanoj suferas pro malsato kaŭze de tiu elspezo. La amasigo de armiloj senigas homojn de ĉiutaga manĝaĵo, vestoj, hospitaloj, lernejoj. Oni devas haltigi la amasigon de armiloj.

La danĝero de hidrogena katastrofo estas intensigita de tiuj, kiuj kredas, ke tutaj teritorioj de la mondo povus servi iliajn egoismajn celojn. La monda paco kaj sekureco estas endanĝerigataj de tiuj, kiuj klopodas malhelpi la landojn, kiuj sin liberigis de kolonia dependeco, vivi en paco.

Oni entreprenu agresivajn aktivecojn kontraŭ la nacioj kaj homoj luktantaj por sia rajto de memdecido, sendependeco kaj socia progreso.

- der esperantist.

*

Hungario, malgranda lando kun lingvo apenaŭ konata trans la etnaj limoj, ĉiam montriĝis fekunda grundo por la celoj de la Esperanto-movado. La hungara socio ĉiam montris kaj montras seriozan intereson en la monda lingvo-problemo. Pluaj interesaj faktoj sur paĝo 6.

SUDAFRIKA ESPERANTO-ASOCIOP. O. Box 1227, Cape Town.

Prezidento: S-ro E. de Kock.
 Vic. Prezidento: S-ro A. von Blottnitz.
 Sekretario: S-ro O. Sher.
 Kasisto: S-ro C.S. Beckford.
 La Komitatanoj: S-ino A. Fouché, S-roj H.J. Appel,
 D-ro J.v.d. Strydom, F.M. Woolf.

ENHAVOJ.

Alvoko al la Virinoj	1
Enhavo	2
Ĉefartikolo	3
Anonco en "The Star" pri E-o Kurso	4
Amikeco inter la Popoloj	5
Io pri la Venonta UK Ŭrbo	6
Ezopa Saĝo	7
La Mirinda Inventaĵo	8
Ciferoj pri la 66a UK	9
I.E. Klubo Aŭtomobilista	10
Iom pri Niaj Venteraĵoj	11
Simpligita Anatomio	12
Memoroj	13
Tra la Mondo	14
Deziras Korespondi	15
El Nia Gramatiko	16

Redaktoro: F.M. Woolf, Box 18, SEA POINT. 8060. Tel:
 (hejme) 44.2657, helpe de C.S. Beckford, tel: 22.6326,
 hejme, 77.0588.

JARKUNVENO DE LA
SUDAFRIKA ESPERANTO-ASOCIO

La 19a jarkunveno de la Asocio okazos dimanĉon la 20an de Marto 1983 je 14h30 ĉe s-ro H.W. Appel, 8, St. Michael Rd., New Redruth, Alberton 1450 (Tel. (011) 869.4031).

TAGORDO

1. Antaŭa protokolo kaj traktado de aferoj estiĝantaj el ĝi.
2. Raporto de la Prezidanto.
3. Raporto de la Sekretario kaj pritraktado de korespondaĵoj.
4. Raporto de la Kasisto.
5. Elekto de nova Estraro.
6. Aliaj aferoj.

Mi petas, ke oni sendu al mi, kiel eble plej frue, nomojn de membroj, kiujn oni deziras proponi por elekto al la nova komitato/estraro, kun ilia konsento agi se elektitaj. La nunaj komitatanoj estas petataj informi min, ĉu aŭ ne ili konsentas al refoja elekto por plua jaro.

Membroj, kiuj ne povas ĉeesti la kunvenon, estas petataj ensendi siajn komentojn, opiniojn, ktp., al mi, por ke oni povu pritrakti ilin sub la ĉi-supra ero 3. Mi speciale deziras ricevi raportojn pri Esperanto-agado de la diversaj grupoj tra la lando.

La financa raporto por la jaro 1982a aperas sur aparta folio.

* O. Sher,
Sekretario.

La Prezidanto, Estraro kaj ĉiuj Komitatanoj deziras al niaj membroj, kiel ankaŭ al ĉiuj legantoj de Bona Espero feliĉan kaj prosperan novan jaron, en bona sano kaj en paco.

*

aperos en la Johannesburga "Star" sekve de invito al nia senlaca membro, s-ro H.W. Appel, peranto de SEA, partopreni en grup-anonco de la Johannesburg Council for Adult Education, "al kiu apartenas ± 100 tre diverstipaj societoj, ĉiu el kiuj iel aktivas en la kultura vivo de la urbo", laŭ s-ro Appel, kiu plue diras: "The Star", en la komenco de Januaro publikigos kompletan liston de ĉiuj kursoj pritraktotaj de la societoj por la jaro. Tio pleningos kelkajn tutajn paĝojn de la gazeto. Se montriĝos sufiĉe da intereso mi klopodos trovi plej eblan konvenan kursejon por la plejmulto de la kursanoj. Se estos nur kelkaj, mi povos instrui en mia hejmo."

SEA tre multe estimas la entreprenemon de s-ro Appel, kies imitindan ekzemplon espereble ankaŭ aliaj membroj laŭpove sekvos en niaj alilokaj centroj. Ni deziras al li ĉiun sukceson, kaj li fine havu bonajn rezultojn.

La anonceto legiĝas:

ESPERANTO (complete elementary) course, commencing Wednesday evening, 23rd. Feb, 30 x 1½ hrs., R30.00. Venue and time to be arranged with the students. For further details write as early as possible to the ESPERANTO-SOCIETY, 8, St. Michael Rd., New Redruth 1450.

*

Subite ekestis fajro sur la kvara etaĝo de hotelo. Jam ne plu estas eble atingi savstuparon, nur tra la fenestroj oni provu. Antaŭ la hotelo oni tenas rondan gudrotukon por ricevi tiujn kiuj kuraĝas-elsalti. La gastoj hezitas, sed la flamoj pliproksimiĝas. Hotelstabano kuraĝigas la gastojn.

Al Usonano li diras: "Oh boy, vi povas gajni kelkajn dolarojn de la ĵurnalistoj malsupre atendantaj", kaj la Usonano saltas.

Al Franco li diras: "Atendas vin varmsangaj belulinoj, oh la la", kaj jen saltas la Franco.

Al Germano: "Estas ordono!" "Jes, s-ro Ĉefkelnero". Aŭdiĝas klako de kalkanumoj, kaj la Germano estas survoje.

Al Nederlandano: "Salti tra la fenestron estas malpermesate"! Tuj saltas la Nederlandano.

*

- Ensendis s-ro H. Appel.

De la 21a ĝis la 29a de Aŭgusto en la urbo Rimini disvolviĝis la 3a mitingo por la amikeco inter la popoloj.

Fundamenta temo de la internacia renkontiĝo estis "La Rimedoj de la Homo". Tiun temon oni debatis je internacia nivelo laŭ specifaj punktoj: Popoloj kaj riĉeoj - artoj, komercoj, regadoj - la familio - la scienco - la laboro - la religia sperto nuntempa. Tutmondaj fakaj eminentuloj partoprenis per kleraj prelegoj. Ankaŭ Esperanto havis sian lokon por debat-renkontiĝo pri : Esperanto - rimedo de l' homo por la dialogo inter la popoloj. Ĝin prezentis Pastro A. Ciccanti, Prez. de UECI kaj d-ro Tadolini, delegito de IEF.

En la Ekspozicio de la Libro estis originalaj kaj tradukitaj verkoj en Esperanto kaj ties gramatiko en diversaj lingvoj.

La lastan tagon Papo Johano Paŭlo 2a mem vizitis la internacian mitingon kaj alparolis la milojn da gejunuloj prezentante Dion la unua rimedo por la homo, rimedo el kiu fontas ĉiuj aliaj rimedoj por la savo kaj la progreso de la homaro.

Oni kalkulas, ke pli ol 300 000 gejunuloj partoprenis la 9-tagan mitingon, kies sukceson certigis 1300 volontuloj. Ĉiam pli montriĝas, ke ĉi tiu mitingo estas granda okazo por renkontiĝo inter personoj el diversaj landoj, kulturoj, ideologioj, havantaj komunan pasion por la homo kaj lojalecon por la Vero.

Precize tio, kio superregas la intereson de unuopuloj kaj de grupoj, konsistigas la kapablon de senpaga devoligo kaj de starigo de ia speco de Internacieco de la Solidareco. Tiu ĉi, t.e., la kapablo de senpaga devoligo, ne por memintereso sed por pasio de la homo, estas unu el la fundamentaj homaj rimedoj al kiuj oni dediĉis ĉi tiun mitingon. La nepagiteco estas la animo de tiu solidareco.

*

Kun plezuro ni presigas tiun ĉi informleteron laŭ la peto de la koncerna asocio establita en Rimini, Italujo. La kialojn por tio oni povas ĉerpi el la memklarigaj detaloj ĉi-supre. Ĝi estis disvastigita ankaŭ tra multaj aliaj same alpetitaj landoj partopreni en ties publikigado.

- La redakcio.

Indas partopreni la 68an UK en Budapeŝto

ĈAR la UK estas la plej grava kunveno de la tutmonda Esperantistaro, kaj la programoj de la Universala Kongreso enhavas allogajn erojn por ĉiuj parolantoj de la lingvo.

ĈAR Budapeŝto estas unu el la plej belaj urboj de Eŭropo; troveblas en ĝi ravaj naturaj belaĵoj, la (blua) Danubo kun imponaj pontoj kaj florplena insulo, arbarkovritaj montetoj preskaŭ meze de la urbo, arkitektura varieco, bele rekonstruita historia kvartalo kaj vigla kultura vivo; riĉaj muzeoj, bildgalerioj, altnivelaj muzikaj tradicioj.

ĈAR Ĉirkaŭ Budapeŝto, je distanco de nur kelkaj dekoj da kilometroj, troviĝas multaj pitoreskaj ekskursejoj, kiujn ĉiujare plezure vizitas centmiloj da eksterlandanoj.

ĈAR Hungarujo estas lando en kiu kunfandiĝas riĉaj, vivantaj popolaj tradicioj kaj moderneco; ĉar ĉi tiu lando jam konsciis, ke internacia kunlaborado estas baza kondiĉo por vasta disflorado de naciaj valoroj.

ĈAR la Esperanta kulturo ŝuldas multajn siajn atingojn al la filoj de ĉi tiu lando, ekde la plej frua tempo de la Esperanta movado: en 1900 ĉi tie paŭlo LENGYEL savis la vivon de la revuo "Lingvo Internacia"; ĉi tie aperis "Literatura Mondo"; de ĉi tie "Budapeŝta Skolo" disradiis sian grandan kontribuon al la kultura evoluo de Esperanto; ĉi tie vivis Julio BAGHY kaj Kalman KALOCSAY, du gigantoj de la Esperanta kulturo, kaj nuntempe en ĉi tiu lando aktivas unu el la plej viglaj Landaj Asocioj de UEA.

La oficiala peranto de la venonta UK estas s-ro C. Beckford, nia kasisto, de kiu vi povas ricevi ĉiujn, pluajn informojn, kaj pri la Kongreso mem, kaj pri Hungarujo kaj ĝia ĉefurbo Budapeŝto.

*

Mi konas du junajn gefratojn,
Ludante li ŝatis soldatojn.
Si pli ŝatis pupojn,
deprenis la jupojn,
sed nun ili ŝanĝis la ŝatojn.

- El PLUK: Poul Thorsen.

Simion havis homo foje,
tre ofte ludis kun ĝi ĝoje,
ĝin por amuzo kaj plezuro
kunportis eĉ dum marveturo.
Sed jen, tempesto eksovaĝis.
La ŝipo dronis. Homoj naĝis.
Dum la simio pene provis
elnaĝi, ĝin delfeno trovis,
kaj, ĉar ĝi homo ĝin rigardis,
bonvole ĝian vivon gardis,
surdorse prenis ĝin por porto
al seka kaj sekura bordo.
Nu, kiam ili al haveno
Pireo (rodo de Atheno)
alvenis, la delfen' scivolis:
"Ĉu Athenano?" "Jes!" - parolis
tre fanfarone la simio -
"eĉ el plej nobla familio!"
"Do, vi Pireon konas bone?"
"Pireon? Certe, kiel do ne?
Li estas ja al mi tre kara
amiko, plej familiara!"
Kolere pro l' mensogo, la delfeno
dronigis la amikon de haveno.

LA MENSOGEMA PAŜTISTO

Paŝtisto ŝafojn paŝtis sur herbejo,
foje ekkriis li kun granda veo:
"La lup', la lup'!", la homoj venis kure,
nenion vidis - li mensogis nure.
Plurfoje li danĝeron same signis,
la homoj kur_s helpi, kaj indignis.
Sed foje, jen, la lupo venis vere.
"La lup', la lup'!" - li kriis malespere.
Sed liaj vortoj jam ne trovis kredon,
La lupo tiam havis riĉan predon.

* - Ezopa Saĝo,
K. Kalocsay.

Oni povas esti pli ruza ol iu alia, sed ne pli ruza ol
ĉiuj aliaj.

- La Rochefoucauld.

Mi vidis lin rampi ĉirkaŭ arbo.

- Pardonon, ĉu vi perdis ion? - mi demandis.
- Ne, kial mi devis perdi ion?
- Al mi ŝajnas, ke vi serĉas objekton.
- Jes, mi serĉas skribilon.
- Sed, se vi ne perdis skribilon, kial vi serĉas ĝin?
- Por trovi ĝin. Mi devas. Mi volas verki libron. Ĉi vespere mi estos libera kaj havos nenion legi. Tial mi decidis verki ion.
- Sed ĉu ne estas pli facile aĉeti pretan libron. Estas jam sufiĉaj verkitaj ...
- Mi scias. Mi memoras el la lernejo, sed preferas mem verki. Mi al tio alkutimiĝis. Eĉ la titolon mi jam elpensis: La Silenta Don Huano!
- Pri kio vi rakontas? Ĉu ne estas pli bona: La Silenta Don? Aŭ ni diru: Don Huano?
- Tiaj libroj jam ekzistas. Pro tio mi verkos: La Silenta Don Huano-n. Ĉu al vi plaĉas mia ideo?
- Ne tre.
- Ne gravas. La libro ankaŭ ne estos io speciala.
- Sed kial ne verku bonan libron?
- Bedaŭrinde mi jam verkis tian.
- Ĉu tiel? Mi gratulas vin. Pri kio oni rakontas en ĝi?
- Mi ne havas koncepton. Mi ankoraŭ ne legis ĝin. Povas esti, ke mi verkis ĝin en la franca, sed ĉar mi ne scipovas tiun lingvon estas sence komenci ĝin...
- Sed ne scipovante la francan, kiel vi verkis france?
- Erare. Home estas erari, ĉu ne? Feliĉe mi trovis homon, kiu tradukos ĝin el la franca en la svedan.
- Kaj ĉu vi scias la svedan?
- Kiu? Ĉu mi?
- Kiamaniere vi do tralegos vian libron?
- Mi ne legos ĝin. Al mi ne plaĉas la skandinavia lingvo.
- Ĉu vi jam trovis la skribilon?
- Ne, sed mi divenis, ke ĉi-vespere la televido prezentos belan filmon. Tial la verkado de libro forfalas. Mi rigardos la filmon...

Mi ne scias kiomfoje mi jam konvinkiĝis, ke la televido vere estas mirinda inventaĵo!

- El Interligilo.

1899 kongresanoj el 50 landoj

31 infanoj el 10 landoj

166 programeroj kaj 20 ekskursoj

800 bildoj faritaj de la Foto-Servo

Abunda dokumentaro disponigita al la kongresanaro inkluzive:

48-paĝan Duan Bultenon

48-paĝan Informbroŝuron pri kie manĝi kaj trinki en Antverpeno

112- paĝan Kongresan Libron kun suplementa 8-paĝa kajero pri la Arta Programo

ampleksajn skribajn klarigojn pri la vizitindaj lokoj por ekskursantoj; ĉiuj kongresanoj aŭtomate ricevis plurajn kolorajn turismajn faldfoliojn

10 IKU-prelegoj fare de fakuloj el 9 malsamaj landoj.

*

La inaŭguron ĉeestis diplomatoj de Aŭstrio, Brazilo, Ĉinio, Danlando, Francio, FR Germanio, Germana DR, Hungario, Israelo, Jugoslavio, Pollando, Portugalio, Sudafriko kaj Usono. Skribe salutis la Kongreson la ambasadoj de Aŭstralio, Britio, FR Germanio, Indonezio, Sudafriko. Svedio, Svislando, Vatikano kaj Zambio, kaj la ĉef-ministro de Nov-Zelando.

*

- Budapeŝta Informilo,

LIMERIKO

Sur monto en alta Tibeto

Simila al osta skeleto,

Sidadis ermito

en muta medito

pri l' gusto de ŝafa kotleto.

fondiĝis en 1965 kun la celo aplikadi Esperanton kiel solvon de la lingvaj problemoj en la aŭtomobilistaj medioj.

IEKA havas 1200 membrojn en 35 landoj. En la jarlibro de UEA vi trovas 60 SOS-aŭtodelegitojn, kiuj pretas helpi esperantistojn rilate al aŭtomobilistaj aferoj. En la jaro 1978 okazis ralio al la Universala Kongreso en Varna. Reprezentantoj en 14 landoj helpis la aŭtomobilistojn. S-ro Hector Boffejon, Sempach, helpe de ok specialistoj laboris por eldono de aŭtomobilista fakvortaro en 7 lingvoj, kiu entenos 5 000 vortojn. La vortaro sendube estos ege utila verko.

Rilate kotizon IEKA estas la plej modesta organizaĵo. Ĝi havas nur malaltan kotizon de 20 francaj frankoj, kiu estas dumviva. Ĉiu aŭtomobilisto kaj ĉiu Esperantisto interesata pri tiu faka movado povas aliĝi al IEKA, pagante la dumvivan kotizon. Kompense vi tuj ricevos la insignon kun la kluba emblemo. Aliĝojn volonte akceptas Otto WALDER, Esperanto-weg, CH-8590, ROMANSHORN, Svisujo.

- Budapeŝta Informilo.

*

RADIO KAJ TELEVIZIO

La 23an de lasta majo, je la 18h15, BBC-RADIO TIMES prezentis 45-minutan programon sub la titolo "A Universal Language". En tre objektiva kaj serioza maniero red. A. Wilding prezentis la Internacian Lingvon, helpata de konataj britaj Esperantistoj, i.a., H. Barker, F-ino Marjorie Boulton, d-ro J.C. Wells, s-ro G. Leon-Smith, H. Barks. Nome de la Esperanta Parlamenta Grupo parolis lordo Brockway kaj Robin Squires. Je la fino oni donis la adreson de la Esperanto-Centro en Londono kaj en la naŭ postaj tagoj alvenis 700 leteroj. Ĉiuj skribintoj ricevis, i.a., la unuan lecionon de la nova senpaga poŝta kurso.

*

En POLLANDO Radio Polonia elsendas nun Esperanto-programojn kvinfoje ĉiutage!

*

Tiu ĉi rubriko ekzistas jam multajn jarojn, kaj la celo ekde la komenco estis diskonigi amuzaĵojn, strangaĵojn kaj nekutimaĵojn kaj la legantoj, kiom mi scias, multe ŝatis ilin. Pro tio, ke pli ol kelkaj el ili devenas de diversaj landoj kaj el multaj popoloj (kaj ne sole, ekzemple, de Oslo!) pluraj el tiuj okazintaĵoj, kiuj ĉe blankuloj aŭ flavuloj aŭ nigruloj estas ĉiutagaĵoj, estas strangaj kaj amuzaj por la aliaj. Ke Ĥinoj, ekzemple, frandas hundojn kaj putrajn ovojn aŭ ke multaj nigruloj trovas raŭpojn bongustaj, tio ja estas stranga ĉe blankuloj. Ĝis nun la nekutimaĵoj plaĉis al ĉiuj, sed subite iu stultulo en gazeto 'La Kancer Kliniko' asertis, ke ili konsistas pleje el rasistaj anekdotoj! La kritiko do gajnis la dubindan honoron mem fariĝi venteraĵo - la unua el Esperanta gazeto.

Tiun ĉevalon (la rasistan) oni jam ĝismorte rajdis. Do oni bonvole anstataŭe akiru alian ĉevalon (temon), ne gravas ĉu pri skaraboj, filmstelulinoj aŭ novspeca alkoholaĵo! Se iu grupo da personoj ŝatas vivi laŭ la apartaj emoj de sia raso, ili do estas rasemaj, alivorte, ili estas rasemuloj, aŭ rasistoj. Dum jarcentoj la Hebreoj preferis resti iom aparte de la aliuloj, por ke ili povu senĝene praktiki siajn religion kaj kulturon, ne ĝenante la aliajn. Pro tio kaj pro nenio alia oni dum generacioj kruele persekutis ilin - la kompatindajn rasemulojn (rasistojn)!

(Ĉio tio laŭ aĉa anonco en la etgazeta ĉi-supre nomita 'La Kancer Kliniko' kiu, hazarde, montras blasfeman kovrilŝercbildon de aĉaspekta Dio sur nubeto ĉirkaŭ la supro de speco de Pisa-simila turo).

*

- E.S. Venter.

En norda Sud-Okcidentafriko lokaj krimuloj el transe de la landlimo daŭre mortpafas la tre malmultajn rinocerojn nur por havigi al si la unusolan kornon por vendi tion altpreze. Por gardi kontraŭ la malapero de la bestoj spertulo sugestis ke, pere de ĥemiaĵoj, oni dormigu la rinocerojn kaj rapide forsegu la kornon.

La samo estis sugestita rilate elefantojn. En la Krugera Sovaĝbestejo krimuloj el Mozambiko jam mortigis tutajn gregojn sole por la eburo. Dum lasta Marto tri da ili estis mortpafitaj de la gardistoj. - Letaba Herald.

Gesinjoroj, la homa korpo konsistas el tri partoj. La unua estas la kapo, sur kies tegmento kreskas la kapfadenoj, kelkfoje kaj ĝuste ankaŭ nomitaj pedikarbaro. Por kaŝi aŭ ornami la kapfadenojn oni surmetas kapkovrilon, kiu ludas ankaŭ la rolon de salutaparato. Sur la kapfasado troviĝas du vidiloj. Inter ili estas la flarilo kiu - pli speciale dum la vintraj monatoj - fariĝas mukfonto. Sub la mukfonto malfermiĝas la manĝo-truo, kiun enkadrigas du manĝotru-randoj. Tre ofte la supra trurando de la matura viro ornamiĝas per brososimila **filtrilo**, kies ĉefa utileco ŝajne estas malhelpi, ke vermiĉeloj kaj similaĵoj tro rapide malaperu en la manĝotruon. Ĉe ĉarmaj fraŭlinoj kaj junaj edzinoj tiuj manĝotrurandoj nomiĝas ĝenerale kiskusenoj. Se ni eniras en la manĝotruon ni vidas, ke ĝi entenas multajn maĉilojn - ĝis 32 - kaj unu ordiganton. Tiu ĉi zorgas ne nur pri justa disdono de la maĉolaboro, sed ankaŭ pri purigado de la maĉiloj kaj pri forigo, pli aŭ malpli brua, de eventualaj ĝenantoj. Tiu ordiganto estas tial tre okupita kaj preskaŭ ĉiam restas hejme. Ĝi eliras nur ĉe solenaj okazoj kaj eĉ tiam nur dum mallonga tempo.

Ambaŭflanke de la kapo kreskas la kapfolioj nomitaj ankaŭ aŭdiloj, kies rolo dum la junaj jaroj de l' homido estas ĉefe **pedagogia**. Dum tiu periodo ili nomiĝas pinĉkarno. Poste ili malhelpas, ke la salutaparato kovru la tutan kapon. Inter la kapo kaj la busto troviĝas la kravattubo, kiu estas kvazaŭ kanalo inter la manĝotruo kaj la digestujo. Ambaŭflanke de la busto pendas la signalstangoj, ĉe kies ekstremaĵo senriproze moviĝas la universalaj preniloj.

Por sin movi la homo posedas du ir-stangojn, kiuj aspektas kiel natura plilongigo de la sidkarno. Krom tio la ir-stangoj havas ankoraŭ alian utilecon: ĉe la viroj ili donas certan rigidecon al la pantalono, dum ĉe la inaj elementoj ili cenpocente pravigas la araban proverbon, kiu asertas, ka "la beleco de silkaj ŝtrumpoj dependas de la enhavo".

La ekstremaĵo de la ir-stango nomiĝas ŝukarno, tiel nomita, ĉar estas ĝi, kiu plenigas la ŝuon. Dank al sia ŝukarno la homo povas stari.

- Raymond Schwartz.

Frue en 1945. Apud Singaporo, iom okcidente de la haveno, troviĝas grupo de ses el bambuo konstruitaj barakoj, ĉirkaŭitaj de alta pikildrata barilo. La barakaron kaj ĝian enloĝantojn gardas filoj el "La Lando de la Leviĝanta Suno".

Estas nokto. Plenluno brilas. Tiaj noktoj videble nervozigas "niajn gastigantojn".

En la barakoj, sur malaltaj plankoj el fenditaj bambustangoj, lacaj militkaptitoj klopodas dormi en spaco larĝa je 45 cm por ĉiu persono. Ĝenas la humida varmo kaj zumado de muskitoj kiel ankaŭ multnombraj cimoj. Silento regas en la tropika nokto. Ne bruas trafiko, nek aŭdiĝas homaj voĉoj. Kaj malplenaj stomakoj ne sukcesas forteni la dormon. Preskaŭ neniu aŭdas la klaran voĉon de salamandro, iom distance: ĥeeko...ĥeeko...

Tra la miloj da insektvoĉoj ekpenetras, unue neperceptebla, tre alitipa zumado. El jamaj spertoj la subkonscioj de la homoj atentigas ilin pri io okazonta. Jen kaj jen dormantoj ekmoviĝas. Diskoniĝas la averto:

AEROPLANOJ, AEROPLANOJ!!! Ĉiuj komprenas, ke ĉi tiuj ne venas por saluti nin sed por detruĝi stokojn de benzino kiujn la japanoj aranĝis ĉirkaŭ la kaptitejo, supozante, ke nia ĉeesto evitus aeratakon fare de niaj amikoj!

En kelkaj sekundoj malpleniĝis la barakoj. Ĉiuj rifuĝis en apudaj fosaĵoj, kiuj ebligis teni la kapon sub grundnivele. Jam ekfajfas la unuaj bomboj. Eruptis infero. Serio de eksplodoj preskaŭ surdigas la sendefendajn homojn.

En la bruego enmiksiĝas la pafoj de japanaj kontraŭ-aviadilaj kanonoj. Bomboj falas pli kaj pli proksime. Mia koro bategas... Ĉu mi en la sekvanta momento pulvoriĝos? Tenante la kapon sub grundnivele mi rigardas supren. Kviete brulas miloj da steloj, tute ne skuitaj de la eksplodantaj bomboj ... estas kvazaŭ ŝarĝo defalas de miaj ŝultroj. Subite timo ne plu premas min. Kial mi timus? Ĉiu stelo troviĝas sur sia trako, rapidas laŭ sia vojo. Mi klare konsciiĝas pri la Grandeco de Tiu, Kiu kreis aŭ ankorau kreas la universon. Ĉio okazas laŭ Ties plano.

Ĉu mi iĝis fatalisto? Ne! Mia estis la tasko ŝirmi min mem kaj la kunulojn inter la limoj de la mensaj kaj fizikaj kapabloj al mi donitaj; ĉio cetera restas ekster miaj respondeco kaj kapablo.

ARGENTINO: De la 2a ĝis la 19a de Aprilo okazis en Buenos Aires internacia libro-foiro vizitita de ĉ. 700 000 homoj. Tie staris informa ekspozicio de Esperanto, ĉe kiu oni vendis E.lernolibrojn. La ĉefa celo de la stando estis informi pri Esperanto. Disdoniĝis kelkmilojn da informiloj.

ĈEĤOSLOVAKIO: Laŭ la Prezidento de ĈEA, vivas en la lando minimume 20-30 mil homoj, kiuj regas Esperanton. Ekzistas ĉ. 70 lokaj grupoj kaj rondoj. ĈEA eldonas 3 regulajn kaj 2 neregulajn periodaĵojn.

FINNLANDO: La Civitana Instituto de Oulo ankaŭ dum la ĵus komenciĝinta studjaro havas en la programo Esp.-instruadon. Troviĝas elementa kaj daŭriga kursoj, sub la gvido de Osmo Buller.

GERMANIO (F.R.G.): Blieskastel: Dank' al la sindediĉa laboro de Günther Becker kaj kelkaj liaj helpantoj, la libro "Post la Kurso" de Wingen nun troviĝas en sia tuto sur kasetoj kaj servos al la blindaj Esperantistoj en la germanlingvaj landoj.

HISPANIO: La Internacia Sporta Simpozio, kiu okazis en Julio en Madrid, sub la Honora patroneco de Juan Carlos I, Reĝo de Hispanio, kaj sub la aŭspicioj de UEA kaj HEF, pritraktis la medicinajn, jurajn, sociologiajn, ĵurnalismajn, historiajn, lingvajn kaj handikapulajn aspektojn de la sporto. La temoj estas analizitaj de bazaj raportoĵoj eldonitaj libroforme.

KOREO: La 13.06.1982 Koreaj Esperantistoj havis la unuan sport-konkurson en kolegio Indok. Unuan premion gajnis la Esperanto-klubo de Universitato Gjonghui.

SVEDLANDO: Ankaŭ ĉi-jare la Esperantista Klubo de Malmö partoprenis per informa budo kaj ekspozicio pri Esperanto en Skania Foiro, kiu ĉi-jare okazis por la 64a fojo inter la 20a kaj 29a de Aŭgusto.

USONO: La 13.04.1982 en la Nov-Jorka oficejo de UEA okazis prelego por kvardeko da membroj de Ligo de Virinoj de UN, organizaĵo por la edzinoj de UN-stabanoj. La tre bone akceptitan prelegon pri "Esperanto, Komunikado kaj UN", faris d-ro Humphrey Tonkin. **

Por subteni kaj ampleksigi la agadon de la Novjorka Oficejo de UEA, 92 japanoj donacis entute 8 042 guldenojn.

Estimataj,

Mi estas 14jara knabino kaj mi tre volas trovi amik(in)-on en via lando. Ĉu vi al mi helpos? Tutkorajn salutojn,
Lenka Masařiková, 78811 Loučná n/d 772, Okres Šumperk, SUMPERK, CSSR.

Bonan tagon, samideanoj,

La novfondita Altenburg-a Esp.Klubo "Malnovkastelo" deziras korespondi kun viaj samlandanoj. Ĝis nun ni estas batalantoj. Por ke kresku niaj adeptoj, bonvolu perinian adreson en iuj gazetajn kaj klubajn adresojn kaj informilojn pri via lando. Respondoj estas garantiataj.
Malnovkastelo, H.-Georg Kaiser, 7400 Altenberg, Wenzel Str. 12, G.D.R.

Estimata samideano,

Mi estas filatelisto kaj kolektas uzitajn. p.markojn el la tuta mondo. Mi tre ŝatus trovi en via bela lando seriozan filateliston cele al interŝanĝado. Mi esperas, ke en via societo troviĝas iuj, kiuj helpos min. Mi estas 63jara pensiulo, eksoficisto. Mi povas sendi tutajn seriojn de p.markoj eldonitaj dum la lastaj 25 jaroj, kiel ankaŭ aliajn. Mi atendas skribaĵojn kun proponoj kaj tre dankas vin por via helpo. Kun amikaj salutoj,
Dusio Luigi, Via A. Certosa n. 13 (14100) ASTI, Italujo.

*

HERALDIKO, VEKSILOLOGIO, Terminaro en Esperanto, de Klement Jaroslav: La heraldiko, scienco pri la blazonoj, evoluiĝis en la mezepoko, konekse kun la geneologio de nobelaj familioj kaj dinastioj. Sed aparte de ili ankaŭ urboj kaj ŝtatoj simboligas sian identecon per blazonoj. Inter blazonoj kaj flagoj ekzistas malvastaj historiaj rilatoj. Flagoj ja longan tempon estis nur tukoj portantaj blazonon. Kun la evolu^o de modernaj ŝtatoj, malpli aŭ jam tute ne ligitaj al iu dinastio, la ŝtato akiris gravecon, kaj sekve la scienco pri flagoj sendependiĝis de la heraldiko. Tio precipe validas por la 20a jarcento en kiu ekestiĝis multaj novaj ŝtatoj kun novaj flagoj. Aktualiĝis flagscienco kaj internacie ricevis nomon faritan el la latina radiko de vexillum, flago, kaj la greka logio, scienco pri io, do veksilologio.

PRI KUNMETITA PASIVA VERBO: La formoj "amatas, amitas" ktp., anstataŭ "estas amita", per si mem ne prezentus ian rompon en nia lingvo kaj, se la Akademio volus ilin aprobi, oni povus tre bone ilin uzi. Tamen, se la privataj aŭtoroj per sia p r o p r a iniciativo volus uzi tiujn formojn, mi ĉi tion ne konsilus. Privataj aŭtoroj povus enkonduki tiun ĉi novan formon nur en tiu okazo se "as, is", ktp., signifus "estas, estis"; sed, kvankam pli aŭ malpli frue la verbaj finiĝoj eble ricevos la signifon de la verbo "esti", tamen ĝis nun ili tiun ĉi signifon NE havas.

PRI LA KONSTRUO DE KELKAJ VERBOJ: Vi trovas, ke kelkaj verboj havas duoblan sencon kaj tial oni ne scias precize kiamaniere oni devas ilin uzi. Ekzemple oni ne scias ĉu oni devas diri: "Mi instruas mian infanon pri Esperanto" aŭ "mi instruas Esperanto al mia infano". Laŭ mia opinio la neklareco tute ne ekzistas. En unu kunveno esperantista iu faris la demandon, ĉu oni devas diri "mi amas vin" aŭ "mi vin amas", kaj la kunvenintoj varmege kaj tute senrezulte disputadis pri tio ĉi tutan vesperon; tamen le respondo estis ja tute simpla: AMBAŬ frazoj estas bonaj. Tiu sama respondo laŭ mia opinio devas esti donata al la demando pri la verboj kun duoblaj komplementoj. Kiu devigas nin diri, ke el la supre cititaj frazoj pri instruado nepre unu devas esti rigardata kiel bona kaj la dua kiel malbona? Ili ja ambaŭ estas konstruitaj tute regule laŭ la leĝoj de nia lingvo, ambaŭ estas tute klaraj kaj egale elegantaj, sekve AMBAŬ estas tute bonaj kaj la uzado de la unua aŭ de la dua devas esti libere lasata al la persona gusto de ĉiu uzanto aŭ al la stilaj postuloj de la teksto. Eĉ se vi aliformigos la frazon aktivan en frazon pasivan, vi ankaŭ ricevos nenian malklarecon, ĉar kiu povas havi ian dubon pri la senco de la esprimoj "homo instruita" kaj "scienco instruita"?

- L.L. Zamenhof el "Lingvaj Respondoj".